

Kluba Programo:**majo:**

- 6 Literatura diskutrondo(1) – ĉe Ibis
- 13 Stan Keable: *La Vivo de Lanti (plue)* – ĉe Diorama (1800h: konsilantaro)
- 20 Literatura diskutrondo (2) – ĉe Ibis
- 27 John Wells: *Lingva Seminario* – ĉe Diorama

junio:

- 3 Babil-vespero – ĉe Ibis
- 10 *Duolingo: lingvo-kurso furora* – ĉe Diorama (1800h: konsilantaro)
- 17 Babil-vespero – ĉe Ibis
- 24 Promen-ekskurseto tra Green Park/St James' Park (*vidu malsupre*)

julio:

- 1 Babil-vespero – ĉe Ibis

24-a de Junio se sufiĉe bona vetero 19.15

(Se pluvos, aŭ se meteorologoj estos tiutage prognozintaj daŭran kaj/aŭ fortan pluvon, okazos anstataŭe neformala kunveno en Hotelo Ibis. En kazo duba, bonvolu unue informiĝi telefone ĉe 07541 413989) (aliel la 1-a de Julio 19.15 - anstataŭ la kunveno en Hotelo Ibis)

- Renkontiĝu ĉe la lago apud la unua eniro al la parko St James' en Birdcage Walk post Horse Guards Rd. (proksimume 500m for de stacio Westminster – elirejo 6 plej taŭgas). Busoj 3, 11, 12, 24, 53, 87, 88, 148, 159, 211, 453. Necesejoj (50p) en subpasejo de elirejo 6.

Depende de la progreso tra la parkoj, la promeno finiĝos ĉe unu el la stacioj Green Park, Hyde Park Corner, aŭ (per Hyde Park) Marble Arch.



Vivo de Lanti - 13 junio

Lanti aŭ **Lantio** (pseŭdonomo de **Eugène ADAM**, en esperanto **Eŭgeno Adamo**, naskiĝinta la 19-an de julio 1879 en Nehou, Francio; mortinta la 17-an de januaro 1947 en Meksiko) estis franca esperantisto, fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (1921) kaj longjara redaktoro de klasbatala revuo *Sennaciulo*.

(informo de Vikipedio)

Esperanta Kalendaro:


23-30 julio 2016: 101a Universala Kongreso; Nitra, Slovakio. Informo: www.nitra2016.sk; info@esperanto.sk

09-12 septembro 2016: Internacia Amikeca Renkontiĝo; Aylesford, Kent. Informo: anica_page@btinternet.com

Aliaj anoncoj:

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la Sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a julio por mencio en la sekva Kluba Bulteno.



Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,
NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Hotel Ibis, 3 Cardington Street, NW1 2LW (por
babilvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:


18:30 malfermiĝo, babilado en la vestiblo

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 21:45 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la
ĉefprogramero

22:00 fermiĝo de la klubejo



Loko:

Metrostacio: Euston, Warren St (linioj Victoria kaj
Northern)

Euston Square (linio Circle)

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205,
390; krome: 453, C2 (Dioramo); 59, 68, 91, 168,
253, 476 (Ibis).

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,
Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,
11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB
01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto: Heleno Fantom;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Roland England, Stan Keable, Anna Lowenstein, Renato Corsetti, Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com,
anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Glate sukcesis la
lastatempa Jarkunsido de
LEK, la 1an de aprilo, pri la
jaro 2015. Elektiĝis novaj
Konsilantoj (**RENATO
CORSETTI** kaj **ANNA
LOWENSTEIN**), nova

Honora Vic-Prezidanto (**HELENO FANTOM**); kaj
prezidis **PROF. JOHN WELLS**. Renato kaj Anna certe
aldonos grandan homforton kaj bonajn ideojn al nia
Konsilantaro, dum Heleno, kiu multe aktivis dum jardekoj
en LEK (inkluzive kiel Prezidanto) sendube meritas sian
nunan postenon.

Tri eks-Konsilantoj, al kiuj ni ŝuldas dankojn pro laboroj
dum 2015, estas **DIANA ROBIN**, **OLGA KERZJUK** kaj
MATT PEPPERELL. La Londona Esperanto-Klubo jam
antaŭguas ties partoprenojn en la kutimaj kunvenoj de
2016 kaj poste!

Ĝuste pro tiaj novaĵoj, bonvolu kontroli la ĝisdatigitajn
rubrikojn de tiu ĉi bulteno, por certigi pri la oficistaro ktp.

Kaj nun al printempo kaj somero. Ĝuindaj kaj allogaj
programeroj atendas vin! (Tamen, zorgu pri la 6a de
majo, ĉar tiam okazos Literatura Diskutrondo - anstataŭ
antaŭe anoncita Babil-Vespero.) Poste en majo, **STAN
KEABLE** daŭrigos sian serion pri Lanti; kaj en junio
LEKanoj kunvenos subĉiele, por promeni en du Reĝaj
Parkoj de Centra Londono. Venu do!

LEK faru kiom eble plej multajn aferojn, antaŭ la 'feri-
sezono' de julio kaj aŭgusto, por ke niaj Kongresumantaj
anoj fanfaronu ĉe la UK kaj aliloke en Esperantujo, ĉu
ne? Jen alia kialo kontribui al nia kluba vivo kaj lingva
komunumo, per (interalie) ĉeestoj. Niaj Babil-Vesperoj
ĉe la Hotelo Ibis ja superis niajn esperojn, kaj pri
nombroj de personoj kaj pri vigleco, do ni superu niajn
esperojn en ĉiuj kampoj de agado. Kun nia nova sango
kaj nuna memfido, ĉio eblas.

David Thornell

